

Svisa federismo, 3-a parto

Claude Gacond, 155-a radioprelego, 1966.09.21 & 1966.09.24 & 09.28 & 1966.10.01

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond pri la svisa federismo kaj la provo federi Eŭropon.

La unua svisa konstitucio estis trudita de la franca registaro en aprilo 1798. Ĝia centralismo ne povis konveni al lando kun kvar lingvoj, du sampotencaj religioj kaj dudeko da politikaj centroj.

A.- Por esprimi sian abomenon al tiu trudita respubliko, nomata **Helveta Respubliko unueca kaj nedividebla**, la svisoj nomis ĝin ŝerce **Helveta Respubliko unueca kaj nevidebla**.

Cl.- Kun unuanimeco ili faris ĉion eblan, por ke tiu respubliko estu fakte nevidebla. La kantoj, kiuj konstitucie posedis landkunvenon (en la germana **Landsgemeinde**), rifuzis dum tiuj landkunvenoj tiun truditan konstitucion. La arbaraj ŝtatoj Uri, Schwyz kaj Unterwalden (en la germana **Waldstätten**) decidis organizi interkantonan armeon kaj elektis armeestron.

A.- Oni povas kompreni, ke la franca armeo tuj intervenis. Sed tiuj intervenoj ne helpis tiun konstitucion fariĝi pli **videbla**.

Cl.- Svislando estis nura satelito de Francio. Pro tio ĝi fariĝis ideala okazejo por bataloj inter la franca armeo kaj tiuj de la kontraŭa koalicio.

A.- Se vi foje veturos tra la pasejo Gotardo, tiam vi rimarkos en la gorĝo **Schöllenen** memorigilon, kiu atestas la trapason de rusa armeo gvidata de generalo Suvarof.

Cl.- Du tendencoj montriĝis en la svisa politika vivo. Unu estis centralismema, la alia federalismema. Ambaŭ deziris novan konstitucion. Sed neniu akceptis fari kompromison.

A.- La franca generalo **Bonaparte** konstatis la fiaskon de la trudita reĝimo. Li proponis novan pli federalistan konstitucion. Tiu propono nur akiris la disputojn.

Cl.- Tiam nova konstitucio estis proponita de la franca registaro kaj submetita al plebiscito. Ĝi estis nete rifuzita per 92 mil ne kontraŭ 72 mil jes kaj 162 mil sindetenoj.

A.- La organizintoj de la plebiscito tiam adiciis la jesojn al la sindetenoj kaj proklamis la novan konstitucion akceptita per grandega plimulto.

Cl.- Generalo Bonaparte antaŭvidis civilan militon. Estis bona kaŭzo interveni en la svisan vivon. Li do ordonis al la franca armeo forlasi la svisan disputejon.

A.- La kantono Schwyz kunvokis Dieton kun la tagordo redakti novan konstitucion. Anstataŭ akordiĝi la ambasadoroj blinde defendis la kantonajn patriotismojn. La berna ambasadoro havis teritoriajn pretendojn super la eksaj kolonioj ĵus liberigitaj. Oni povas kompreni, ke tiuj eks-kolonioj ne volis akcepti tiun renaskiĝantan bernan imperiismon.

Cl.- Kelkaj kantoj kreis komunan armeon kaj elektis generalon.

A.- Dum jarcentoj, pro neekzisto de centra registaro, plej diversaj disput-kaŭzoj amasiĝis sensolve. Nun fine ĉiu provas trudi sian vidpunkton.

Cl.- Inter la kantoj naskiĝis militoj. Ĉu oni povas nomi ilin civilaj militoj? Mi ne pensas.

A.- Generalo Bonaparte revenas kun forta armeo por trudi sian mediacion. Svisa delegacio devas iri al Parizo por akordiĝi pri nova konstitucio.

Cl.- Ĝi neniel akordiĝas. Tiam generalo Bonaparte verkas mem federalistan konstitucion. La svisoj devas ĝin akcepti.

Svisa federismo, 3-a parto

Claude Gacond, 155-a radioprelego, 1966.09.21 & 1966.09.24 & 09.28 & 1966.10.01

A.- En karikaturaj oni vidas sinjorinon **Helvetia**, kiu provas resti en ekvilibro sur kalcitrema azeno, kiun francaj soldatoj obeigas, dum ĉirkaŭe svisoj ridaĉas.

Cl.- Oni ne povis veki senton pri sviseco en popoloj, kiuj estis kulturintaj dum jarcentoj kantonan patriotismon.

A.- La konstitucio proponita de generalo Bonaparte estis sufiĉe taŭga por lando kiel Svislando. La malnovaj kantoj estis restarigitaj kaj ricevis la rajton mem decidi pri sia kantona konstitucio.

Cl.- Ĉiuj malnovaj kantoj revenis al siaj malnovaj kutimoj. La ekskolonioj kontraŭe sin donis demokratajn konstituciojn.

A.- Kunvivado inter tiuj du specoj de kantoj ne estis ebla. Kiam Napoleno falos en **Waterloo** sinjorino **Helvetia** ne plu povos obeigi sian kalcitreman azenon. Ŝi tuj falos, kiam la francaj soldatoj foriros. Kaj la svisoj ĥore ridaĉos.

Cl.- En 1809 en Vieno la ambasadoroj de la eŭropaj ŝtatoj grupiĝos en Kunveno. Ĉu la svisoj fine kapablos silentigi siajn kantonajn disputojn por sendi komunan federan delegitaron ?

A.- Tute ne ! Tion ili ne povas fari, ĉar fakte federo ne ekzistas. Pro tio kvin delegacioj iras reprezenti en Vieno la interesojn de la svisoj, aŭ pli bone, la disputojn de la svisoj.

Cl.- Metternich, la ministro pri eksteraj aferoj de Aŭstrio, kaj la caro Aleksandro la unua, devis trudi sian volon por silentigi la disputojn de tiuj strangaj svisoj.

A.- Karikaturisto bone priskribas la svisan etoson en tiu epoko. Oni vidas la kantonajn ambasadorojn en Dieto, kiu kunsidis dum 17 monatoj en Zürich. Kelkaj el ili verŝas akvon en kriblilon, aliaj rigardas la akvon forflui, kaj la ceteraj ridas kaj sin minacas pro religiaj diferencoj. Ĉiuj provas sin diferencigi de la ceteraj.

Cl.- Rezulto : ne estis la svisoj mem, kiuj desegnis siajn kantonajn limojn, sed la ambasadoroj de la grandaj potencoj. Kaj tion ili faris, ne profitante al Svislando, sed al la najbaraj potencoj. Kiam la svisoj ekrimarkis tion, tiam la Viena Kongreso jam de longe estis ferminta sian pordon.

A.- Ĉu la eŭropa vivo ankaŭ ne ofertas similajn kondutojn ?

Cl.- Vi aŭdis Radio-Svislandon ! Claude kaj Andrée Gacond diras al vi : Ĝis reaŭdo !

-oOo-